

Esperanta Universal-Biblioteko.

Paul Christaller, Stuttgart.

Kial Ido

en la rolo de

Internacia Lingvo

ne povas superi la lingvon


Esperanto?

Riga.

Riga Stelo Eldonejo.

~~701 756-7.ESP~~

701 756-7.ESP
8



**ESPERANTA
UNIVERSAL-BIBLIOTEKO.**

Kolekto de „RIGA STELO“ N 8.

A₁
Esp

Paul Christaller, Stuttgart.

Kial IDO

en la rolo de

INTERNACIA LINGVO

ne povas superi la lingvon

Esperanto?



Riga.

*Riga Stelo Eldonejo & korespondantoj en
Pariso, Londono, Berlino, Genèvo, Barcelono, S. Peter-
burgo, Moskvo, Tiflis, Tomsk, Warszawa.*

707.756 - A. ESP
8

UNIVERSAL-BIBLIOTEKO.
Kolekto de „RIGA STRATO” N. 24.



Paul Christaller, Stuttgart.

KIAL IDO

en la tolo de



Tipografio de K. Narkevič & P. Janulevič,
Riga, Elizabeta strato № 24.



Riga, Elizabeta strato № 24.
Paris, London, Berlin, Göttingen, Barcelona, St. Peterburg, Moskau, Leningrad, Kazan, Odessa, etc.

Antaŭparolo.


Al la kunbatalantoj por nia bona afero mi prezentas la ĉi-studajon, aperintan unue en „Riga Stelo.“ Ĝi helpu daŭrigi nian fervoron, kiu jam venkis multajn malhelpaĵojn metitajn de niaj kontraŭuloj sur nian vojon.

Samideanojn, kiuj scias la germanan lingvon mi ankaŭ jam nun atentigas al „Waffen für Esperanto“ (armiloj por Esperanto en la kongreslibro de la VII^a Germana Kongreso, Danzig-Zoppot 1912, kiu liveras mallongajn respondojn al multaj riproĉoj kontraŭ Esperanto ĉu de personoj kontraŭaj al ideo de lingvo internacia, ĉu de anoj de aliaj sistemoj kaj precipe de Idanoj.

„Forte ni staru fratoj amataj“.

P. Christaller.

Stuttgart, Majo 1912.



Antiquarolo

At la katalogetoj por sia bona etc.
no m-prenas la katalogojn, apertin-
tan antaŭ la 15-a de Julio. On helpe
distingi nur la verkojn, kiuj jam venkis
multajn malhelpojn multajn de ni
kontraŭ la nun viron.

Samdeziĝe, tuj se la verkoj
lingvo en antikva jam nun atingas al
„Wollen für Esperanto“ (armoj por Es-
peranto en la kongresoj de la VII-a
Germana Kongreso, Dusseldorf 1912).
La libroj multajn respondojn al ni
kiu tiamoj kontraŭ Esperanto kiuj per-
sonoj kontraŭ la ideo de lingvo inter-
nacia. Ĉu do oni devas atenti kontraŭ
preco de laŭ.

„Fore ni staru ĉiuj amataj“

P. Christaller

Zürich, Maio 1912





De Esperanto en la 1907-a jaro deriviĝis nova lingvo, nomata Ido, kies anoj pretendas, ke ilia idiomo estas supera al Esperanto, ke ĝi estas „simpligita Esperanto“; ili prefere ĝin nomas „Reform-Esperanto“, kvankam ili bone scias, ke la esperantistoj juĝas tian vortuzon ne honesta. Kaj ĉiu senpartia homo konsentas, ke ne estas nobla maniero uzi nomon, kiu jam akiris famon en la mondo, por enŝovi propran fabrikaĵon. Kaj la esprimo „Reform-Esperanto“ certe jam multe helpis al la idanoj por gajni sekvantojn, ĉar la homoj sin okupantaj pri helpa lingvo ĉiam estas progresemaĵoj, kaj tial ili ŝatas la vorton reformo. Ĝenerale kun tiu esprimo oni ligas la sencon de plibonigo. Kaj kiam oni multe fanfaronas, eĉ per diroj ne ĝustaj, oni kompreneble, iom atingas sian celon. Oni ekzemple diras pri fama „delegacio“, kiu kunigis tiom da scienculoj, tiom da societoj, tute silentante pri tio, ke mono kaj subteno por tiu kuniĝo precipe venis el Esperantujo, kaj ke post la akcepto de Ido multaj aliĝintaj personoj aŭ societoj, protestis*) kontraŭ la agadmaniero de l'ĉeforganizintoj de la „elekto“ de helpa lingvo, kaj multaj pliaj

*) La listo de la protestintoj estas senpage ricevebla de la Centra Oficejo, 51, rue de Clichy, Paris.

societoj aŭ iliaj reprezentantoj farus la samon, kiam ili havus ian intereson fari ĝin, ĉar la tutgranda plejmulto el tiuj personoj aŭ societoj estas tute indiferenta pri la nun ekzistanta konkuro inter Esperanto kaj Ido,

Kial nun ni uzas kaj instruas kaj propagandas Esperanton kaj ne Idon?

Ni komencu per vorto de s-ro L. E. Meier-Munĥeno, kiu montras tri el la tialoj, kiuj nin tenas ĉe Esperanto. S-ro Meier estas unu el la plej malnovaj germanaj esperantistoj. Li multe laboris pri kaj por Esperanto, precipe tradukante novelojn kaj poemojn**). Post apero de Ido, li tute aliĝis al ĝi, opiniante ke la nova idiomo estas plibonigo de Esperanto. Ĉar teorie multe el la diroj de la duldo-patroj kaj-papoj ŝajnas unuarigarde akceptinda; ankaŭ mi mem unue juĝis tiele, eĉ nun ankoraŭ mi akceptus kelkajn ŝanĝojn faritajn en tiu sistemo. Nu, antaŭ la Aŭgsburga Esperanto-kongreso 1910, s-ro Meier skribis al mi: „mi sciigas vin ke mi nun definitive forlasis „Idon“ kaj ree aldonis min al „Esperanto“, ĉar miaj dujaraj spertoj firme konvinkis min, ke Ido, pro siaj senĉesaj reformoj, aliigoj kaj plibonigoj, proponitaj de ĉiuspecaj personoj, neniam fariĝos finita, certa kaj praktika lingvo. Due: laŭ la intencoj de la estroj de la propagando de Ido, tiu ĉi idiomo fari-

**) Edziĝa festo en Capri (Kapri); En monaĥejo de Sendomir; Ama vivo en la naturo; Wilhelm Tell; Kantaro.

ĝu lingvo taŭga nur por instruitaj homoj, sed ne ankaŭ por simplaj personoj, kiuj absolvis nur elementaran lernejon; laŭ mia opinio „mondlingvo“ devas taŭgi por ĉiuj homoj, verkistoj kiel laboristoj ktp., sed ne nur por instruituloj. Tria: Nur tia lingvo internacia fine venkos, kiu altiris la plej grandan anon, kaj Ido neniam povos superesti tiurilate Esperanton!“ Ni priparolu la tri punktojn nomitajn kaj poste aldonu kelkajn pliajn.

I. Ido pro siaj senĉesaj reformoj, aliigoj kaj plibonigoj neniam fariĝos finita, certa kaj praktika lingvo.

Unuarigarde estas tre aprobinda la diro: ni ne katenas nin per rigidaj leĝoj, ni ĉiam estas pretaj akcepti kaj enkonduki plibonigojn, ni estas emaj al ĉiu vera progreso. Sed praktike baldaŭ montriĝas ke tia devizo ne estas oportuna; la sperto montris ke ĝenerale la homoj, almenaŭ la amaso da ili, aliĝas al tia ideo nur kiam ĝi vidas la aplikon en la vivo. Prof-ro Ostwald, ekzemple, en Usono gajnis multnombrian adeptaron por la ideo de internacia lingvo nur post kiam li montris Esperanton jam vastigita kaj multuzata. Nu, ĉiu aferisto, industriisto, kiu legas la cititajn vortojn, diros al si: mi atendas ankoraŭ ĝis la lingvo estas fiksa, antaŭ ol mi elspezos monon por katalogoj verkitaj en ĝi. Ankaŭ la eldonistoj de libroj hezitos eldoni je propra risko ion gravan. Aliparte

ĉiuj ŝatantaj disputon pri lingvaj aferoj venos grandare por fliki tie aŭ tie, por proponi eĉ tute ŝanĝitajn projektojn. Tiaj disputemuloj certe multe ŝatis la revuon „Progreso“, kiu unue estis malfermita por ĉiuj tiaj proponoj. Sed kiam la „Ididoj“ tro multiĝis*), tiam la redaktanto, — ĉiam prava, eĉ pravega, tamen flatema kaj ŝajne cedema al personoj, kies nomoj estas gravaj por lia celo — forskuis la nekonvenulojn, uzante amindaĵojn kiel „malsaĝa“ k t p., kontraŭ unu verkema lingvoaŭtoro, kiu monatojn antaŭe estis altŝate laŭdita — ĉe sia idaniĝo. Oni devas ja diri ke en „Progreso“ tute senpartie estas presita alia, teorie tre bona lingvosistemo, sed iun tagon la redaktanto deklaris ke li nun volas dediĉi sian revuon al la plibonigo de Ido sola, kaj unu sia trabanto eĉ skribis, ke Ido bezonas periodon de netuŝebleco. Kiu ne ridas, memorante la antaŭajn riproĉojn al Esperanto pro la netuŝebleco de ĝia „Fundamento“! Cetere fakto estas, ke Ido nur tuj post ĝia akceptiĝo ŝanĝiĝis gravamaniere, deposte la idestroj prudente sin gardis, oficiale enkonduki gravajn reformojn, kaj ili nun povas diri: „ni estas ĉiam progresemaj,“ kaj samtempe: „nia lingvo ne ŝanĝiĝis notinde.“ Sed kio ne estas, povas fariĝi**).

Profesoro Ostvald, kiu ŝajne ne intencas esti aŭ resti sekvulo de la idopatroj, jam publike avizis, ke Ido bezonas ankoraŭ reformojn kaj ke li baldaŭ proponos ilin. Ni supozu ke la idanaro kreskegas, tiam

*) Pri sep Ididoj vidu „Lingvo Internacia“ 1909, pĝ 321. Krom ili estiĝis du Antidoj.

***) Pri tio vidu pĝ 10^a kaj 11^a.

certe diverslandaj lingvistoj eble ankaŭ ekstraktos Idon, kaj ili verŝajne trovos siajn specialajn punktojn ŝanĝotindajn. Mi kredas ke Ido ne povas ripozi, krom, se ĝi kuŝas en ĉerko. Esperanto kontraŭe havas sian Fundamenton fiksitan, ĝi ne estas tro detala por ĝeni la uzantojn, tamen ne tro liberlasa por ebligi disfalon. Ĉiu iomete pripensanta la aferon devos konfesi ke tia lingvo absolute ion bezonas, kiu kompensas la ĉe naciaj lingvoj ĝeneralan uzadon, fiksitan en la popolo mem. Dum la regado de l' Ido-patroj, ilia afero povas ankoraŭ iomete prosperi, sed kiam ili iam forlasos la kampon, tiam eble regos Akademio, same fruktoporta kiel tiu de „Idiom Neutral“, kiu de dudek jaroj vivetas kaj ŝanĝiĝas, dum fundamentita Esperanto almilitas la mondon. Mi ja tute ne diras, ke Esperanto estas plene perfekta, precipe ne por ĉiam, sed mi rezonas, ke ĝi estas kiel internacia lingvo pli taŭga ol ia nacia lingvo, ke ĝi estas pli perfekta laŭ konstruo ol iu ajn internacia. Kaj: kiam naciaj lingvoj taŭgus por la aspirata celo, se oni povus konsenti pri nur unu el ili, kiel ne povus Esperanto plene, eĉ pli multe taŭgi, malgraŭ iaj difektoj, kiuj cetere ne por ĉiuj kuŝas ĉe la samaj punktoj?

II. Laŭ la intencoj de siaj estroj Ido estu lingvo por instruituloj.

Ĉiam la Idanoj fanfaronas, ke ilia idiommo estas pli simpla ol Esperanto, ke ĝi estas pli bone lernebla ankaŭ por nekle-raj homoj. En oktobro 1910 okazis en Bruselo disputa vespero inter Idano kaj Esperantisto *) La unua legis dum du

*) Pri tio amuze rakontas sro Bourlet en „La Revuo“, pĝ. 136, Novembro 1910.

horoj pri la preferindo de Ido, kaj lia temo estis „la leĝo pri la plej malgranda peno“. Fine la aŭskultantoj laciĝis kaj deziris aŭdi la kontraŭulon. Tiu, prof. Bourlet montris en trikvaronhora, fajra parolado, kiel por „simpligi“ Esperanton, Ido amasigis esceptojn sur esceptoj kaj ĉiufoje, kiam li klarigis belan komplikajon de la „linguo“, li sin turnis al la idano, demandante: „Ĉu ĝi estas, Sinjoro, ankoraŭ la „Leĝo“ pri la plej malgranda peno“, kiu inspiris tiun escepton aŭ tiun komplikajon?“ La unuan fojon la aŭdantaro ridis, la duan fojon ĝi ridegis, la dekan fojon tordiĝis, kaj poste la ĝenerala sekretario de la internacia Instituto de Bibliografio kaj de la Oficejo de Internaciaj Asocioj diris al li: nun mi komprenas, ke vi esperantistoj kutime malŝatas diskuti kun la idistoj, kaj uzas pli bone vian tempon propagandante vian lingvon“. Kaj du tagojn poste ĝeneralo Sébert-Paris ricevis avizon, ke la nomitaj Instituto kaj Oficejo oficiale alprenas Esperanton.

Nun mi montru kelkajn punktojn certigajn, ke Ido vere ne estas pli simpla ol Esperanto:

Alfabeto. Certe estas, ke la Ido-alfabeto estas por la presistoj, sed nur por ili, pli oportuna ol tiu de Esperanto; pro tio, ke ili ne bezonas specialajn literojn. Ankaŭ **x** por **ks** aŭ **kz** estas simpligo, sed **ch**, **sh** anstataŭ **ĉ**, **ŝ** estas malsimpligajoj, same precipe la antikva **q**, kiu formas duan literon por la sono **k**, (en **x** oni eĉ havas trian); samtempe la litero **u** ricevas post **q** kaj **g** duan prononcmanieron, nome,

kiel **V**. La Esperantaj **ĵ**, **ĝ** estas kunigitaj en **j** (**j** fariĝis **y**) kaj oni povas ĝin prononci dumaniere (kiel **ĵ** kaj **ĝ**), kio vere ne estas bonaĵo. Per tiu ŝanĝo oni tre ofte ŝanĝis la vortbildon konservatan en Esperanto laŭ la naciaj formoj: budjeto (E:budĝeto), etaĵo (etaĝo), Aljero (Alĝero), jelato (ĝelateno), jirafo (ĝirafo).

Akcento. En Esperanto: La akcento ĉiam estas sur la antaŭlasta vokalo: domo, ĝardeno. Aŭstrio.

En Ido (laŭ verko de Janotta): La akcento estas ĉe infinitivoj ĉiam sur la lasta, alie en kelksilabaj vortoj sur la antaŭlasta vokalo: amar, parolar, abelo, diligenta, ĝardeno. Tamen estas senakcentaj (ne formantaj apartan silabon):

1) **u** post **a**, **e**, **q**: laudo, neutra, quo;

2) **i** kaj **u** antaŭ alia vokalo, en kelkvokalaj radikoj: filio *) precipua Aŭstrio; male ĉe unuvokalaj radikoj: dio (tago) duo; sed oni diras: sundio (dimanĉo) lundio (lundo), jovdio (ĵaŭdo).

Interesa estas ĉi tie, ke en 1908-a jaro ankoraŭ ekzistis nur la unua regulo, poste por pli plaĉi al instruituloj, oni ankoraŭ pli „simpligis“ Esperanton, aldonante la pluan regulon.

Gramatiko. Ĉi tie oni povas konstati ĉe Ido simpligon, ĉar ĝi nur malofte uzas akuzativan formon, same multenombrian formon de l' adjektivo. Tamen tia ne povas esti kaŭzo starigi konkuran idiomon; kaj ĉar D-ro Zamenhof, eĉ jarojn antaŭ naskiĝo de Ido, skribis ke oni uzu nominativon kiam oni ne estas certa pri

*) Unue oni skribis : filyo.

la ĝusta kazo, la komencanto ja povas komence agi laŭ tiu konsilo, prefere ol ĉiam meti akuzativan formon post prepozicioj, kio ofte okazas. Simpligo certe estas tia lida regulo, sed — ne plibonigo, ĉar la frazoj estas ofte malpliklaraj. Oni ofte diras, ke multaj popoloj ne posedas akuzativan formon, pro tio ĝi estu forigota. Sed oni ne pripensas, ke fakte per tia manko tiuj lingvoj prezentas malbonaĵojn, oni ne tiel rapide komprenas la sencon, oni ofte bezonas aliajn formojn, parolturnojn malpli simplajn, por fariĝi tute klara. Ekzemple, kiam mi diras: „la patro vokas la filo, la patrino la filino“, tiam oni ne scias, ĉu li vokas ĉiujn tri, aŭ ĉu la patrino vokas la filinon. Sed: „la patro la filon, la patrino la filinon“ tio estas tuj klara, kaj ankaŭ multe pli belsona. En la Zamenhova „Preĝo“ la „frat' fraton atakas kruele“ ne estus klara sen la „n“; oni povus opinii, ke oni ripetas „frato“. Same la nevarieblo de l' adjektivo estas simpliga sed ne plibona; tre ofte povas naskiĝi konfuzo aŭ oni devas atenti pri fiksita vortordo, kiu estus katenigo por la lingvoj ne havantaj la saman vortordon. Cetere la Idestrojekkonis ke ĉe sole starantaj adjektivoj ne estas evitebla multenombra formo, kaj oni akceptis **i** aldonotan: „bonai“, kio kaŭzas la plian escepton pri akcentado, ke ankaŭ ĉi tie la **i** ne estas aparta silabo: krom tio oni uzas en maloftaj okazoj apartan multenombbran artikolon „**le**“, nur por eviti la klaran, simple kaj facile uzeblan regulon de Esperanto, ke la adjektivo akordiĝas kun sia substantivo: la bonaj patroj, la belan

domon. Kiam mi aldonas ke Ido por 16 Esperantaj pronomoj posedas 38, oni vere ne rajtas paroli pri simpligo. Ankaŭ la fama, de la Idestroj malŝatata „tabelo“¹⁾ montras en la Ida anstataŭaĵo malsimpligon por ĉiu simpla homo, kie Esperantistoj devas lerni 14 formojn, la Idanoj havas 24 da ili. Certe multaj estas bonkonataj por latinuloj, aliaj tamen estas same arbitraj kiel en Esperanto: „ulu“ (iu), ankaŭ „ulube“, (ie)²⁾ certe de neniu estos rekonata unuavide. Ankaŭ la klareco estas malpli bona ĉe Ido: „ulu, nulu“ estas³⁾ facile miksebla por la orelo, „iu, neniu“ estas multe pli preferinda. Same je rapida parolo la „e“ (kaj) ofte konfuziĝe kunfandiĝas kun antaŭa vorto, ŝajnigante adverban formon: „du e tri e kvar“ (du kaj tri kaj kvar). Sed la plej granda „simpligo“ kuŝas en tio, ke Ido havas 48 afiksojn, kie Esperanto dum 25 jaroj nur bezonis 34, kaj ĝi estas tute klara krom tio ĉe la Idanoj regas la emo, pli grandigi tiun nombron. Kaj eĉ kelkaj el la sufiksoj ne estas klaraj, ekz-e -o z a signifas plena je, provizita je, enhavanta ion. Laŭ tio ni akceptu leproza (lepra), k u p r o z a (kupra); sed k a t a-

1) Tabelon pri ilia komparo oni trovas en mia broŝuro „Bedarf Esperanto der Verbesserung?“ (Ĉu Esperanto bezonas plibonigon?) eldonita de la Germana Asocio. Altona 1909. Ricevebla ĉe Möller u. Borel, Berlin. Prezo 0,150 Sm.

2) Ad ulube (ien) estas tre luksa „plibonigo.“

3) Por eviti riproĉojn de Idanoj, kiuj ĉiam pretaj havas esprimojn kiel „mensogo, kalumnio“, mi metis singarde estis, ĉar nun eble la lingvo tiurilate estas ŝanĝita.

r o z a (katarema) ŝajnas ne bona; ĉe m a m o z a (kies traduko estis g r a n d m a m a) oni ja ne povas diri: „plena je mamom, enhavanta mamom“; ankaŭ „provizita je mamom“ havas alian sencon. Same l u m o z a (hele lumigita, lumoplena), kiam -oza estas „provizita je“, oni devus eble diri „lumegoza“ aŭ „lumozega“, sed vere „lumplena“ estas pli simpla. Mi ne povas ĉi tie trakti aliajn sufiksojn, inter kiuj -al estas precipe enuiga; kiu sin interesas pri tio, legu la cititan broŝureton. La plej amuziga estas, ke eĉ la „Idestri“ ne ĉiam ĝuste uzas la sufiksojn, ne parolante pri iliaj malpli kleraj fideluloj. Iu laboristo ekz-e uzis „laboroza“, celante „laboristala“ (laborista).

Ni parolu nun pri la **Vortaro de Ido**. Pri ĝi oni legis antaŭ nelonge en „Progreso“ ke Ido jam havas pli ol 5000 vortojn, dum Esperanto nur pli ol 3000. Se tio estas ĝusta, oni tre facile ekkonos, ke Esperanto devas esti pli facile lernebla lingvo. Certe ja ankaŭ Esperanto pliriĉiĝas laŭ tiu rilato, kaj tute prave, kvankam oni devas esti singarda, por ne plene detrui la facilecon de la ĝisnuna Esperanto. Ofte okazas, ke iu verkisto ne sufiĉe konas la jaman vortaron kaj uzas novan radikon tute troan. Aliaj ankaŭ eble ĝin uzas kaj jen la balasto nenecesa.

Sed ankaŭ Ido pliriĉiĝas ne nur laŭ gramatikaj formoj, sed ankaŭ laŭ nombro de vortoj: en 4 kajeroj de „Progreso“ (Aŭg. — Dec. 1910) oni trovas 176 novajn vortojn anoncatajn al la fidelularo; inter ili estas 42 ŝanĝoj de ĝisnunaj vortoj.

Inter la lastaj oni precipe rimarkas forigojn de la „mal“-vortoj. Ĉiu bone komprenos, ke tia procedo malfaciligas la lernadon. Oni ja povas konsenti pri tiaj ŝanĝoj, kiam ekzistas vera bezono pro praktikaj kaŭzoj*), sed la Idanoj sekvas tro multe sian kutimon: kie en nacia lingvo oni havas similajn formojn tie, jes tie kompreneble oni lasu „mal-“ (aŭ ion similan; oni jam diskutis pri „pli internacia“ formo: des-, ne-, non- kaj elektis des-), sed kie ne, tie oni ja forigu la Esperantan „Volapukajon“. Tial certe Ido ankaŭ akceptos „matro“ anstataŭ „patrino“: tre „fama“ sinjoro ĝin jam proponis.

Se ni deprenas la 42 ŝanĝitajn vortojn, ni havas 134 tute novajn. Oni eble supozos: nu, Esperanto estas tro malriĉa, ĝi ne povas ĉion esprimi, kaj Ido ĝin povas. Ho ne, tio ne estas la kaŭzo: Ĉu preĝejo ne sufiĉas (apud kapelo, katedralo)? por Ido ne, ĝi bezonas „kirko“ kaj pli ol duona mondo devas lerni novan vorton, eĉ la angloj, kiuj skribas „church“ kaj prononcas „ĉörĉ“, devas ĝin noti. Ĉu „sur-pentri“ ne sufiĉas? por Ido ne, ĝi trudas al ĉiuj homoj, kiuj ne estas francoj aŭ portugaloj, novan vorton „indutar“. Simile ĉe

bifurkar	(disiĝi, disreli);
bagajo	(pakaĵo);
aniversario	(jartago);
salubra	(utila, iafoje saniga);
naŭfraĵo	(ŝiprompo) ktp.

*) Ekz-e „dekstra, maldekstra“ „fermi, malfermi“ kaj kelkaj aliaj, kiujn oni prave eble ŝanĝos ankaŭ en Esperanto.

Certe la Idanoj povas diri: ni nur nun ŝanĝas kaj aldonas, post malmulta tempo la ĉefa laboro estos finita. Sed — pri elekto de vortoj oni povas sekvi diversajn vojojn: estas dirite en „Progreso“ (1910⁴²⁵): ke la internacieco ĝenerale estas pli granda laŭ la formo ol laŭ la senco, kaj ke la montroj de la naciaj lingvoj koncernas la internaciecon de la formo. — Nu, povas veni Idestroj, kiuj pli atentis la sencon ol la formon de l' vortoj, kio ja certe estas multe pli grava. Krom tio, ĉe la cititaj montroj la vortoj estas tre malavare provizitaj je la literoj rilataj al la naciaj lingvoj. Ekzemple „bifurkar“ havas sian D (Deutsch=germana), tamen la vorto „Bifurkation“ estas tre malmulte konata, mi tute ne memoras esti leginta ĝin, ĉiuokaze mi neniam ĝin uzis kaj nur per mia pli frua lerno de la latina lingvo mi povis derivi la vorton de la latina „furca“. Laŭ la Idana maniero oni certe povas krei „la plej grandan internaciecon“.

La franca vorto „assister“ estas „helpi, kunagi“, sed „assister à quelque chose“ estas „ĉeesti“. Esperanto akceptis por la du esprimoj:

asisti — helpi, kunagi;

ĉeesti — partopreni (kunsidon k.t.p.);

tio estas laŭ la germana uzo de „assistieren, Assistent, Assistenz“, kaj laŭ la angla „to assist, assistance“; por „ĉeesti“ la germanoj ne konas „assist“, do Ido ne rajtas aldoni la „D“ (kaj tre verŝajne ankaŭ ne la „E“=angla) ĉe sia radikilo „asist“. Ido havas:

sokursar, sekundar, helpar=helpi, asisti, kunagi; asistar=ĉeesti; do ĝi devigas lerni du pliajn vortojn kaj konfuzigas la germanojn kaj almenaŭ parte la anglojn.

La Idanoj mokas ja pri la uzo de kunigitaj afiksoj sen alia vortradiko; (ili agas ankaŭ ĉi tie laŭ ilia kutimo en naciaj lingvoj), tamen tia uzo estas tre praktika kaj tre faciligas la lingvon; mi eĉ povas laŭ sperto diri, ke tia eblo kaŭzis al mi kaj al aliaj samideanoj ofte veran plezuron. Certe per tiaj vortoj, kiel ankaŭ per la tabelaj vortoj, la Esperantaj tekstoj ne estas tuj tute klaraj al kleraj neesperantistoj; sed mi tion juĝas esti bonaĵo, per ĝi nia lingvo estas iomete sekreta lingvo eĉ por la kleruloj kaj, kiam ili uzis la malgrandan penon lerni ĉirkaŭ 50 vortformojn, tiam la tuta lingvo malfermiĝas antaŭ ili. Ĉu oni ne devas lerni ankaŭ la Idajn „kreuri“ (kreaĵo)? Ĉiuokaze, kie Ido malakceptas afiksajn kunmetaĵojn, ĝi devas starigi novan vorton, kaj ĉiu nova pli malfaciligas la lernadon, precipe por nekleruloj. Cetere: ĉu la nunaj Idanoj estas konvinkitaj ke tia kutimo neniam penetros en ilian lingvon kaj ke oni neniam uzos „ilo“ anstataŭ „instrumento“? Ni tion atendu. La Idestroj jam permesas la sole starantajn „igar“ kaj „ulo“!

Iu Idano priparolis la kaŭzojn de S-ro L. E. Meier por lia eksidaniĝo kaj ĉe lia dua kaŭzo li nur havis jenan kontraŭargumenton: „tote malvera: la max*) facila por la max*) multa homi“ (la plej facila por la plej multaj homoj). Vere

*) Laŭ la „Decidi di l' Akademio“ oni nun diras „maxim“.

lia argumento ne estas konvinkiga — kvankam ĝi estas frazo, tre feliĉiganta la Idanojn — ĝi estas tute malĝusta. (La vorton „malvera“, — tre ŝatata ĉe la „Idestri“ — mi ne volas uzi, ĉar tiu diro ja venis tie el blinda fanatikeco).

III. Nur tia lingvo internacia fine venkos, kia altiris la plej grandan anaron kaj Ido neniam povos superesti tiurilate Esperanton.

La Idanoj volonte profetas ke Esperanto pereos pro ĝia neprogreso, same kiel ankaŭ Volapük pereis. Tiu diro ne estas trafa komparo: Volapük pereis pro la disiĝo de ĝiaj anoj kaj pro la supereco de la Esperanto-lingvo; ĝi disfalis kaj nenie oni spertis ke Esperantisto fariĝis Volapükisto. Male, komparante la Esperantistaron kaj la Idanaron, mi scias ke diversfoje Idanoj fariĝis Esperantistoj, aŭ ke Idanoj forlasis la aferon, ne trovinte ankaŭ ĉe Ido sian idealon de lingvo internacia. Oni ja scias, ke Ido estigis jam 9 pliajn projektojn, pri kiuj ĉies patro diris, ke lia infano estas la plej bona kaj bela; en Mainz ekzemple okazis, ke la tiea grupo, pro instigo de ĝia prezidanto, fariĝis idista, la estro tamen elpensis novan sistemon, kaj fervore laboris pri ĝi, sed nun? la Idista grupo tie mortis kaj verŝajne baldaŭ tie ekvivos nova Esperantista. En tio ja jam la historio montras la grandan diferencon inter Volapük-Esperanto kaj Esperanto-Ido, ke Volapük grade disfalis post apero de Esperanto, dum tiu ĉi, post apero de Ido havis pli gravajn progresojn ol iam antaŭe. Certe ili estus eĉ pli grandaj, kiam la Idanaro

jam okazis

ne malhelpus nin kaj per sia nova lingvo konfuzigus la ne ankoraŭ varbitojn por la ideo de helpa lingvo. Pri la progresoj de Esperanto dum la pasintaj jaroj estas la jena statistiko*) tre instrua: ekzistis Esperantaj libroj kaj broŝuroj en 1889: 29; 1894: 88; 1899: 123; 1904: 211; 1909: 1327.

Kaj nun kelkajn vortojn pri la progresoj de Esperanto en la diversaj fakoj de l' homa vivo.

Oni ja scias, ke de 1905 ĉiujare okazis niaj **Internaciaj Kongresoj**, dum 1910 oni kalkulis 20 pli malpli gravajn kongresojn en Esperantujo, inter ili estas jam kelkaj, kie Esperanto ne estis celo, sed nur rimedo por celo; mi citu la Kongreson de la Katolikoj (Parizo), tiun de U. E. A. (Aŭgsburg) kaj de „TeKa“ (Kuracista Asocio) en la sama urbo. Sed jam multaj neesperantistaj societoj aŭ kongresoj sin okupis pri Esperanto, aŭ konsilante al la kongresanoj la lernon de l' helpa lingvo, aŭ akceptante Esperanto-korespondadon, aŭ allasante la lingvon por la kongresaj diskutoj. Ni notu inter la rekomendintaj la jenajn organizaĵojn:

La 4-a Latin-Amerikana Kuracistoj-Kongreso, Rio de Janeiro 1909;

La Kongreso de Blindul-amikoj, Napoli, 1909, (oni pledis unanime por enkonduko de Esp-o en la blindulejojn);

La Kongreso por Tutmonda Ekonomio, Mons, 1905;

*) El „Oficiala Gazeto“ III-a jarkolekto, pĝ. 16.

Budapest,
Rom

La Kongreso de Dentistoj,
Brüssel, 1908.

Inter la akceptintoj Esperanton, ĉu kiel skriban ĉu kiel parolan perilon ĉe kongresoj, la jenaj:

La Kongreso de Psiĥologoj,
Genevo, 1909, (ĝi estis la unua scienca kongreso, kie aŭdiĝis raporto en lingvo Esperanto);

La Kongreso de Kuracistoj,
Budapest, 1909, (tie oni havis 3 raportojn en Esperanto, preskaŭ 200 Esperantistoj ĉeestis, kaj ili havis apartajn kunsidojn);

La Unio de Novmaltusianoj
allasas E-on kiel kongres-lingvon;

La Kongreso de la fotografistoj,
Brüssel, 1910; same

La Internacia Pacifista Societo,
München, 1907 (krom tio, ĉe societa konkurso, Esperanto estis unu el la allasitaj lingvoj kaj inter la 43 solvoj estis 3 Esperante skribitaj*).

Precipe notinda estas la venko de Esperanto kontraŭ Ido en Brüssel. Tie oni aranĝis diskutan vesperon kaj ties rezultato estis, ke la Internacia Bibliografika Instituto, Brüssel, kaj la oficejo de l' Internaciaj Societoj alprenis Esperanton**).

*) Pli plenan liston enhavantan pli ol 30 organizaĵoj oni trovos en Propaganda Folio de Esperanto-Propaganda Instituto, K. Steier, Kaiser-Wilhelmstr. 15, Leipzig.

**) Vidu pĝ. 5^{an} kaj 6^{an}.

Tiom pri internaciaj organizaĵoj. Rilate la naciajn, oni trovas en „Espero Pacifista“ pli ol 30 pacifistajn societojn, kiuj akceptadas Esperanto-korespondadon. Kaj diversaj alispecaj societoj akceptis aŭ rekomendis, parte energie Esperanton. Ni rigardu iom la kampon de la **Lernejo**, tiun tiel gravan por nia ideo. Ankaŭ ĝi estas penetrata de nia lingvo. Jen kelkaj notoj pri **Rusujo**: Kursoj en J e n i s e i s k, K a z a n (popola universitato), L o d z, R i g a, T o m s k, V a r ŝ a v a.

Pri **Germanujo**: Unua - aŭ duagrada lernejoj: kie oni instruas Esperanton: en B r a u n ŝ v e j g, D ö h l e n, D e ŭ b e n, D o n a ŭ v ö r t h, D r e s d e n, G o t h a, H a n o v e r, M a g d e b u r g, M ü n s t e r, W e i n b ö h l a. En perfektigaj aŭ komercistaj ktp. lernejoj: A ŭ g s b u r g, B e r l i n. B r e s l a ŭ, C h e m n i t z, D r e s d e n, F r a n k f u r t a - M., G o t h a, H a m b u r g, H i l d e s h e j m, K ö l n, K ö t h e n, L ü b e c k, M ü n c h e n, P o t s d a m.

Pri **Francujo**: A n n e c y, B o r d e a u x (deviga), B o u l o g n e, G r e n o b l e (entute pli ol 600 gelernantoj), L i l l e (jam de kelkaj jaroj ĉiujare 400-500 gelernantoj), L o u h a n s, P a r i s, (de 1906), P o n t A n d e m e r, R o u e n, S t. C l a u d e, S t. O m e r. Alispecaj lernejoj en L e H a v r e, L y o n, R e i m s.

Pri **Anglujo**: Jam en 1909 ekzistis 40 lernejoj, kie oni instruis Esperanton, inter ili estas urboj B l a c k p o o l, D a r l i n g t o n (teĥn.), D e r b y (teĥn.), E d i n b u r g, L e e d s,

London, Nelson, Oxford, (ekzamenoj ĉe universitato) Pinner. En Dublin ĉe la lernejo por hirurgoj oni akceptis Esp-on kiel fako laŭvola en la ekzameno por novuloj.

Plie oni povus citi urbojn en **Aŭstrio, Belgujo, Bohemujo, Brazilujo, Bulgarujo, Fidĵi-Insuloj, Grekujo, Hispanujo, Hungarujo, Italujo, Kolumbio, Meksiko, Nov-Zelando, Peruo, Rumanujo, Svedujo, Svisujo, Transvalo, Tuniso, Turka Azio, Usono.**

Pri la movado inter la **Lernantoj kaj Studentoj**: Oni jam havas landajn ligojn en Anglujo, Belgujo, Bohemujo, Francujo, Germanujo. Krome, en diversaj pliaj landoj lernanto-grupojn. En Beaune, Budapest kaj Luhaĉovice (Moravio), New-York (U. Ŝ. A.) kaj Utiel (Hispanujo) estas sidejoj de internaciaj studento-ligoj.

Ankaŭ inter la **Instruistaro** Esp-o progresas: En Sakŝujo jam ekzistas du ligoj de instruistoj esperantistaj, ankaŭ en Francujo multaj instruistoj estas esperantistaj: jam en la 1906 oni sciis la adresojn de pli ol 1000, sole en Dijon estis 224. Ankaŭ en tiu lando ekzistas unuiĝo de la instruantoj, kaj oni ja bone scias, ke la rektoro de l' Dijona universtitato, s-ro Boirac, estas prezidanto de la Lingva Komitato. La „Internacia Asocio por Instruistoj“ enhavis en la 1909en 21 landoj pli ol 260 membrojn. Konate estas ankaŭ ke prof-ro Mayor en Cambridge, post la tiea kongreso direktis leteron al la landaj lernejoj, atentigante pri Esperanto,

kies instruado devus esti la unua inter la fremdlingvoj.

Rilate al **Arto**, Esperanto penetris precipe en teatrajn rondojn. S-ro Reich estas la unua inter la profesiaj aktoroj, kiuj favoras Esperanton. Li ja aranĝis en Dresdeno la faman prezentadon de Ifigenio; citinda estas ankaŭ aktoro Poolmann -Amsterdam. Plie en Barcelono kaj Washingtono profesiaj aktoroj ludis la kongresajn teatraĵojn.

Multnombraj estas la prezentadoj per neprofesiaj aktoroj, kiuj ofte arte plibeligis esperantistajn kunvenojn. De kelka tempo ankaŭ ekzistas internacia ligo de artistoj por varieteaj teatroj. Pri **Muziko** oni povas mencii la amuzigan Harrison Hill en Anglujo, la Varŝavan artistan societon, kiu anoncis koncertvojaĝon, dum kiu ĝi prezentos Esperanto-kantojn. La Muzika Konservatorio en Valencia anoncis antaŭ 2 jaroj konkursojn, kaj la programo estis verkita en Esperanto.

Ankaŭ la **Scienco** ĉiam pli interesigas pri la nova internacia lingvo. Multnombre jam estas la scienculoj, kiuj aliĝis alla Internacia Sciencia Asocio, kies Revuojam havisian 8-anjaron. Rusa gazeto „Ĥirurgio“ eldonas resumojn de ĝiaj artikoloj en Esperanto, la „Instituto por Internacia Interŝanĝo de Progresigaj Spertoj“ dissendas parolantojn, unu el ili, prof-ro Agache-Parizo, paroladis antaŭnelonge en Berlino, uzante Esperanton. La Amerika Sciencia Kongreso en Santiago (Ĉilujo) aprobis du dezires-

primojn: 1) ke oni alprenu Esperantan instruon en la lernejoj; 2) ke la Usona registaro iniciatu tiun aferon. Mi ne povas mencii ĉiujn akirojn de Esp-o en tiu kampo,*) mi finu per la sciigo ke en Berlina universitato, prof-ro d-ro Ad. Schmidt havas prelegojn pri „Historio kaj teorio de artefaritaj komprenigiloj“. Ke li tie ankaŭ al Esperanto donos ĝian ĝustan lokon, estas ja certe, ĉar li ja jam estis prezidanto de la Internacia Scienca Asocio, kaj estas honora prezidanto de la Berlina Grupo.

Kion diri pri **Komerco** kaj **Industrio!** Ne estas eble resumi en malmultaj linioj ĉion jam akiritan por kaj per Esp-o. Jen kampo sur kiu almenaŭ ankoraŭ dum du jaroj Ido neniel povas konkuri nian lingvon. Ĉar laŭ diro de prof-ro J e s p e r s e n oni bezonos ankoraŭ tian tempspacon por havi sufiĉe pretan lingvon, preskaŭ ne plu ŝanĝotan.***) Certe la Idanoj povas fari intertempe teoriant laboron, tiele ili jam eldonis vortlibreton pri „mashin-elementi.***) Kompreneble, ignorante la rilate malmultajn diferencojn inter Espe-

*) Pli detale oni ĝin trovos en dua propagando-folio eldonita de Esp-o Propaganda Instituto, K. Steier, Kaiser Wilhelmstr. 15, Leipzig.

**) Sed ni atendu, ĉu tiam ne ekzistos aliaj „idestri“, kiuj havos aliajn dezirojn kaj ideojn ol la nunaj.

***) Tiun verkon mi eble alian fojon recenzos, ĉar certe ĝi prezentas kelkan interesajon, se oni pripensas, ke ili havas por nia „forto“ la vorton „fortajo“, ĉar ĉe ili „forto“ estas nia „fortulo“. Iliaj maŝinoj do povas funkcii per „kavalfortaji“ (ĉevalfortoj).

ranto kaj Ido koncerne la teĥnikaj esprimoj, ambaŭ partioj povus kunlabori kaj povas profiti unu de la alia. (Ĉe ni ja kompanse jam ekzistas la „Teĥnika Vortaro“ de Vera x, „Anatomia Vortaro“, „Muzika Terminaro“, „Provo de Marista Terminaro“, „Fotografia Terminaro“, Farmacia Terminaro kaj „Provo de Milita Terminaro“).

Rilate prospektoj, katalogoj, kaj similaj eldonaĵoj en Ido, laŭ mia scio, nenio ekzistas kaj eĉ ne povas ekzisti*), ĉar aferistoj, negocistoj ne estas inklinaj uzi lingvon pri kiu oni ĉiutage asertas: ni ĝin plibonigas kaj plibonigados. Ti-kiu deziras specimenojn de Esperanto-katalogoj skribu al „la Saksa Esperanto-Instituto“ en Dresdeno de tie, kompensante la sendkoston, li ricevos tutan kvanton da ili, ĉar en Dresdeno jam estas pli ol 160 firmoj akceptintaj Esperanto-korespondadon. Grandan nombron da firmoj esperantanaj oni trovos ankaŭ en la „Tutmonda Jarlibro“ de barono de M é n i l (Hachette kaj K-io, Parizo).

Multaj **Komercoĉambroj** interesiĝis pri Esp-o inter la germanoj tiuj de B r o m b e r g, K a s s e l, K a r l s r u h e, L i e g n i t z, S c h w e i d n i t z. Konate estas, ke la Usona komercoĉambro en W a s h i n g t o n invitis la internacian kongreson de 1910 al ĝia urbo, deklarante ke ĝi multe subtenos la aferon kaj dum 1911, 1912 Komerca ĉambro de Los Angeles (Kalifornio) en preskaŭ ĉiuj Eŭropaj landoj uzas la pa-

*) Kiel ankaŭ la literaturo preskaŭ nur konsistas el gramatikaj, vortaraj, propagandaj kaj teorie kritikantaj verkoj.

roladojn de sia reprezentanto, s-ro Parrish, por konatigi la riĉecon de Kalifornio.

Nia U. E. A. (Universala Esperanto-Asocio) estas organizaĵo jam sufiĉe rimarkinda, ĉar ĝi havas jam en pli ol 1000 urboj de l' mondo ĝiajn oficialajn delegitojn, kaj ĝi jam tre ofte helpis je ĉiuspecaj interrilatoj, kaj ju pli tiaj helpoj kaj servoj multiĝas, des pli Esperanto enradikiĝas en la bezonojn de l' mondo, des malpli detruenda estas la lingvo mem.

Nun la **Registaroj**. En Kembriĝo 1907 unu registaro estis sendinta reprezentanton; en Dresdeno 1908, monatojn post la glora apero de Ido, estis du registaroj reprezentitaj; por Barcelono, unu jaron kaj monatojn post la Idiĝo, oni kalkulis 4 registarojn *), Washington, du jarojn kaj monatojn post ktp. oni kalkulis 16 ŝtatojn kaj en Antwerpen estis 17 ŝtatoj reprezentitaj. La Idanoj ja energie asertas, tia sukceso estas ŝuldata al la ideo de lingvo internacia, ne al Esperanto; kaj interne ili eble pensas: kiam estus estinta konata kaj uzata la bonega, la dieca Ido, tiam oni havus duoble pli grandan registaron. Nu, povas esti, ni supozu tion kompleze, sed, certe, se Esperanto ne aperus ĉe la registaroj kiel bona subteninda afero, tiam ili ne agus tiele.

La Idanoj mokas pri tio, ke la hispana reĝo diris, ke li ŝatas Esperanton,

***) La reprezentanto de Meksiko alvenis nur post fino de l' kongreso.

tamen ne povas ĝin lerni pro multaj aliaj aferoj.

Tio ja estas nuraj komplezaĵoj — ili diras. Nu, ĉu ili eble kredas, ke li lernus tuj Idan „quo-qua-qui“ aŭ ĝiajn „-uri kaj -ifi?“ Ĉu tio estas ankaŭ nura komplezaĵo ke la reĝo distingis d-ron Zamenhof per la alta ordeno de Izabella la Katolika? Ĉu en Francujo oni nur pro komplezo iun nomas kavaliro de la Honora Legio? Nu, ni atendu, kiam la fama markizo kaj lia kunpatro akceptos ion tian por ilia „kreuro“ tiam ni legu la fanfaronadojn ke nun fine la talento kaj genio trovis la merititan rekompencan!

Nu, mi citu pliajn „komplezaĵojn“ de registaroj kaj similaj organizaĵoj: En Rusujo, Anglujo kaj Brazilujo, oni permesis oficiale uzi por telegramoj Esperanton, same kiel unu el la ĉefnaciaj lingvoj. En Rio de Janeiro oni havas en la doganaj kaj telegrafaj oficejoj avizojn en Esp-o. En multaj urboj de Francujo kaj Anglujo, kaj en kelkaj de Germanujo, Hispanujo, Belgujo, Bohemujo, la grupoj ricevis subvenciojn por publikaj kursoj, en tre multaj okazoj ĉiujare, (en Barcelono eĉ 2000 pesetojn jare). En Cambridge kaj Cheltenham (Anglujo) la urbestroj salutis la kongresanojn per Esperanto. En Germanujo la „Saksa Esperanto-Instituto“, fondita de saksaj industriistoj, nun estas sub la reĝa ministraro kaj havas oficialajn kursojn kaj ekzamenojn. En Samos la Esp.-gazeto estas presata sen-

page en la ŝtata presejo. En Francujo la propono de parlamentano Cornet pri enkonduko de la helplingvo en la lernejojn ricevis jam 70 subskribojn de siaj kolegoj. Precipe progresemaj estas la registaroj de Nov-Zelando kaj Brazilujo. En la laste nomita lando oni sankciis la Esperantan eldonon de l' oficiala informo pri la nacia ekspozicio. La militministro (nuna prezidanto de Brazilujo) Fonseca kaj generalo Bormann sendis delegitojn al la brazilaj kongresoj; same la ŝtato estis oficiale reprezentita ĉe la Vaŝingtona kongreso. La komisiono pri edukado unuanime voĉdonis por enkonduko de la Esp-a instruado en la lernejojn.

La **Polico** jam akceptis Esperanton en la jenaj landoj: Belgujo (Antwerpen), Germanujo (Dresden, Augsburg, Chemnitz), Magdeburg, Nürnberg, Gera, Leipzig, Schöneberg ĉe Berlin), Francujo, (Paris) Granda Britujo (Cambridge, London, Nottingham, Sutton), Hispanujo (Barcelona, Saragossa, Taragona), Holando (Amsterdam, Haag, Hilversum, Seveningen), Hungarujo (Budapest), Rumanujo (Galatz, deviga instruo!), Svedujo (Stockholm), Usono (Vaŝington).

Ankaŭ ĉe la **Militistaro** kaj **Maristaro** Esperanto parte bone progresis. Grupoj ekzistas aŭ kursoj okazis en Aŭstrio (Zagreb), Belgujo, (Brüssel), Francujo (jam en multaj kazernoj, precipe en la militista lernejo St. Cyr, kie leŭtenanto Bayol fervore laboris por Ruĝa Kruco). Germanujo (Chemnitz), His-

panujo (Madrid, tie ekzistas „Militista Esp-o Societo“, kies honora prezidanto estas la hispana reĝo). Rumanujo (Konstanca), Rusujo (Peterburgo, Vladivostoko, Ĥabarovsk), en tiu lando ankaŭ ekzistas „Asocio de Rusaj Oficiroj Esperantistaj“; Svedujo (Göteborg); Brazilujo (du militaj lernejoj, vidu ankaŭ ĉe „registaroj“). En Anglujo generalo Baden-Powell multe propagandas la lingvon inter la knaboj-skoltoj. *)

Mi preterlasas la progresojn ĉe **Ruĝa Kruco** kaj ĉe **Blinduloj**, kiuj ambaŭ jam estas tre ĝojigaj, ĉe kongreso de blindulamikoj en Napoli oni akceptis unuanime la proponon de Frato Isidoro el Brüssel, enkonduki Esperanton en la blindulejojn.

Kien oni vidas, oni ekkonas ŝaton kaj akcepton de Esperanto kaj vere estas prava la opinio, ke Ido ne povas tiurilate superi Esperanton, precipe kiam oni pripensas, ke Ido bezonas ankoraŭ unu aŭ du jarojn, por esti sufiĉe preta por la „venko kontraŭ Esperanto“, dum nia lingvo intertempe daŭras vastiĝi.

Nun ankoraŭ kelkaj pliaj rilatoj, kie Ido ne povas superi Esperanton. La **Klareco** estas en Ido malpli bona ĝenerale, pro la nevarieblo de l' adjektivo, ekzemple:

Ido: me judikas || Esperanto: mi ju-
la vino bona; || ĝas la vinon bona;
pro tiu malklareco oni en Idujo jam proponis novan prepozicion (kom bona) aŭ fiksitajn vortordon; ambaŭ helpiloj estas malsuperaj ol la Esperanto maniero. Plie:

*) „Boy-scouts“—knaboj-spionistoj.

Ido: la blanka hundo manjas la reda socisi prefere kam la nigrai.	Esp-o: la blanka hundo manĝas la ruĝajn kolbasojn prefere ol la nigrajn; aŭ: la nigraj.
---	---

Oni vidas ke en Esperanto ekzistas la eblo esprimi la du diferencajn sencojn, dum en Ido oni devas diri, por esti klara: la nigra socisi, aŭ: la nigra hundi. Sed tia postulo estas, almenaŭ por germanoj, pli granda ĝeno ol la akuzativa formo.

Oni ja ofte asertas, la akuzativo ne necesas, kelkaj lingvoj ĝin tute ne havas; sed oni forgesas, ke tiuj lingvoj havas aliajn formojn (fiksa vortordo, — ktp.), kiuj estas ĝenantaj al anoj de aliaj lingvoj.

Pli granda estas la neklareco ĉe la parolo:

Ido: la postal e te- legrafala taxi*).	Esp-o: la poŝtaj kaj telegrafaj taksoj.
---	--

Ĉu oni ne pensas facile pri „postale“? nia „kaj“ multe pli distingiĝas de la antaŭa kaj posta vortoj.

Ido: el kompris terpomi, brasiki, na- pi, pizi.	Esp-o: ŝi aĉetis terpomojn, brasikojn, napojn, pizojn.
---	--

Ĉu oni ne povas kompreni: „brasiki, na (aŭ ma) pipizi“? dum per la „ojn“ klare disiĝas la vortoj.

Ido: la questiono ne esas ka ta formi esas nuva, ma ka li esas bona**).	Esp-o: la deman- do ne estas ĉu tiuj formoj estas novaj, sed ĉu ili estas bo- naj.
--	--

*) „Idano“ Dec. 1910¹⁰.

***) „Progreso“ 1910⁵⁷⁵.

Ĉu oni ne povas aŭdi „kata formi,“ aŭ „kataformi“, „maka li“ aŭ „makali“?

Pri „du e tri e „quar“ mi jam parolis en la unua parto.

La ĝusta **Transskribo de propraj nomoj** estas en Ido malpli ebla ol en Esperanto, ĉar al Ido mankas la sono „n“ kaj la diferencigo de „ĵ“ kaj „ĝ“. Mi ja ne diras, ke en Esperanto oni povas transkribi ĉiujn sonojn, ekzistantaj en homa lingvo, tamen oni povas fari ĝin pli bone ol en Ido, kaj Ido ne povas superi Esperanton ankaŭ tiukoncerne. Eĉ multaj aliaj vortoj tre difektiĝas per la Ida sola ĵ (= ĵ, ĝ): ĵirafo, furajo, injenioro, vejetara (ĝirafo, furaĝo, inĝeniero, vegetara).

D-ro Couturat mem konfesas „nia alfabeto nule esas destinata a la transkribo de la propra nomi“ *). Do ankaŭ ĉi tie Ido ne povas superi Esperanton. Certe en multaj okazoj tute ne estas grave, ĉu oni prononcas ĵ aŭ ĝ; tamen se franco parolas al germano pri „Aken“, la germano neniel komprenos lin, sed se li diros „Aĥen“, li estos komprenata eĉ kiam la sono ne estas precize sama kiel la germana.

La lasta punkto, kiun mi citas estas la **Poezio**. Ankaŭ tie Ido ne povas superi Esperanton kaj la Idanoj bone tion scias. Ili do parolas pri la poezio en help-lingvo kiel la vulpo pri la traŭboj ne atingeblaj por ĝi: „on ne devas impozar al la lingvo internaciona postuli estetikal: ol ne esas destinata a literaturo ed a poezio, nam de ta vidpunkto ol esos sem-

*) „Progreso“ 1910⁴⁷².

pre infra a la naturala lingui“ *) (oni ne devas trudi al la lingvo internacia postulojn estetikajn, ĝi ne estas destinata por literaturo kaj por poezio, ĉar de tiu vidpunkto ĝi estos ĉiam malsupera al naturaj lingvoj). Certe oni devas konsenti, ke lingvo internacia estas malsupera al iu ajn nacia lingvo, ĉar tiu ĉi enradikiĝis en la sentojn kaj animojn de sia popolo. Sed tio certe estas la sola kaŭzo de supereco de nacia lingvo. Rilate al tradukoj en alian lingvon mi juĝas, ke Esperanto rajtas rangi apud aliaj lingvoj, alivorte ke tradukoj en Esperanto povas transdoni saman ĝuon kiel traduko en alia lingvo. Mi tion diras laŭ sperto. Eksperimentoj eĉ montris ke tradukoj Esperantante pli precize prezentis la ideojn de la originalo ol tion faris tradukoj en aliajn lingvojn.

Oni legu ankaŭ en „Esperantaj Prozaĵo“ pĝ. 237 kion diris angla profesoro pri la Zamenhofa traduko de Hamlet.

Mi povas ankaŭ mencii d-ron Liesche, pli frua redaktoro de „Germana Esperantisto“, nuna Idano, li estis antaŭ la Dresdena kongreso esperinta, ke oni akceptu decidon Ideman, kaj li ĉagreniĝis pro la ne-plenumiĝo de lia revo. Tamen, post la prezentado de Ifigenio li diris al mi, ke ĝi estis vera ĝuo por li, la plej luma momento de l' tuta kongreso. Tion diris klera homo, kiu konas ankaŭ en sia gepatra lingvo la originalon. Sed, li ankaŭ bone konas Esperanton! Estas kompreneble ke homo, kiu ĝin ne konas, aŭ malmulte konas, ne povas esti same

*) Couturat en „Belga Sonorilo“ 1908 66.

ravata. Se germano, ne sciante, ekzemple, la ĉeĥan lingvon, vidos teatraĵon en ĉeĥa lingvo, precipe tradukitan el germana, li certe ne estos tutkontenta kaj plendos eble pri profanigo de la fama originalo.

Sed Esperanto havas tiel same, kiel iu ajn lingvo, siajn bonaĵojn, kiujn oni ne povas traduki plene en nacian lingvon. D-ro B o r g i u s*) diras, parolinte kontraŭ la Esperantistoj: „Mi ne povas fini, sen mencii teruran malordaĵon... eĉ por la poezio ili kuraĝas uzi la internacian lingvon, sed ĉiuj la ĉefoj de la nuna Esperanto-movado vere ne estas poeziaj homoj. Dio konsentus!“

Nu, mi demandas Esperantistojn, ĉu kelkaj poemoj de nia majstro ne efikas vere poezie, kuraĝigante, entuziasmigante? Kie tio okazas, tie certe estas poezio, mi demandas ilin, kiuj konas la tradukon de G r a b o w s k i pri la „Erlkönig“ (elfreĝo) de Goethe, ĉu tiu traduko ne estas belega, same drasta kiel ekzemple la franca aŭ angla tradukoj, mi eĉ demandas la germanojn, ĉu la kvina strofo en la traduko ne pli bone montras laŭ sonoj, la bruadon de l' vento en la folioj falintaj, pli ol en la originalo? Oni aŭdu:

„Knabeto bela, sekvu min!
la filinoj miaj belvartos vin;
la filinoj lertaj en danca rondform',
kantante, dancante vin lulos al dorm!“

Sed nun ni aŭdu ĉefon inter la Idanoj, ĉu eble li estas vera poeto. Komparu ĉiu la unuan strofon de l' konata „La

*) B o r g i u s. Warum ich Esperanto verliess (kial mi forlasis Esperanton) pĝ 90.

Vojo“ de d-ro Zamenhof, kun ĝia traduko, kiun liveris la „belga sonoriganto“¹⁾:

„Tra densa mallumo briletas la skopo al la qua²⁾ kuraje³⁾ ni iras.

Simile al stelo en nokta cielo

a ni la direkton ol dicas;

e nin ne timigas la noktal' fantomi

nek bati de l' fato, nek moko de l' homi

nam klara e rekta⁴⁾ e tre definitiva

ol esas la voy' selektita.“

Mi aldonu kelke da pliaj ĉarmaj versoj:

„Nur rekte, kuraje³⁾, ne deviacante irez ni en la voy' vizata...“

„Se longa sikeso o venti subita velkinta folyin⁵⁾ dislaceras...“

„...ne cesez! ne cesez! en kordy⁶⁾ a ni sonas“...

Nun mi demandas, ĉu eble la „chefi di Ido“ estas poetaj homoj? Mi kredas firme ke eĉ la plej bona Dio diros: ne, mia kara, tiu estas eminenta lingvoformanto en Idujo, sed poeto ne, tute ne.

Rimarkinde estas ankaŭ la verso „ni... atingos la skopon en gloryo“.

Ĉu eble la akuzativa „n“ estas algluita ankoraŭ kiel ovoŝelo de Esperanto, aŭ ĉu la poeto sentis, ke la senco estos pli klara?

Cetere eĉ d-ro Couturat, se mi ĝuste memoras, iam skribis, ke kelkaj Esperantaj poemoj estas bonaj, kaj se li

1) En „Belga Sonorilo“, mi ne povas citi la kajeron, sed espereble la redaktoro volonte sendos specimenon, li eble estas fiero pri sia „verko“. 2) „A la qua“ je estas tre ĉarma! 3) Pli Couturata estus: „kurajoze“. 4) Oni facile aŭdas „erekta“. 5) Nuna Ido: „folii“, 6) Nuna Ido: „kordio“; apostrofita „kordi“ estas laŭ gramatika regulo=„kordia“.

volas nei la poeziecon, mi opinius, ke li mem estas sama malpoeto kiel lia Brusela amiko. Tio ne estas riproĉo, neniu havas sur ĉiu kampo eminentecon.

Sed tute prava li estas, se li mokas pri kelkaj eĉ multaj „poetoj“ Esperantistoj. Mi tion ankaŭ faras. Tamen mi insistas: Esperanto liveris bonegajn poeziajn tradukojn kaj originalaĵojn. Tio atestas, ke ĝi estas kapabla por literaturo kaj se Ido ne estas same kapabla, tiam ĝi ne povas superi Esperanton sur tiu kampo. Kaj se mi devas elekti inter lingvo ankaŭ-literaturema kaj lingvo ne-literaturema, tiam tuj mi elektos la unuan, ĉar ju pli la homoj kunvenas internacie, des pli naskiĝas ankaŭ iafoje la bezono, tiurilate uzi la internacian lingvon. Mi persone ĝojas pri la konoj de fremdlanda literaturo kaj poezio, kiujn mi akiris per Esperanto.

Sed nun la Idanoj eble diros: atendu, atendu, nun Idujo estas malgranda, ne naskiĝis ankoraŭ la poetoj en ĝi, atendu, ili certe venos. — Jes ni atendu. Nur estas suspektiga por mi, ke la, komence de mia artikolo citita s-ro L. E. Meier, kiu tradukis multon kaj multajn poemojn en Esperanton, li ankaŭ liveris originalajn poemojn, ke, li dum du jaroj da Idaneco, laŭ mia scio, ne eĉ unu poemeton tradukis.

Kaj nun, kiel estas Ido malsupera sur la literatura kampo?

1-e. Estas konate ke la Esperanta poezio pli multe inklinas al tiel nomataj virinaj rimoj (monto, nuboj, seka) ol al viraj (mont', nub', li, min), tamen ni havas per

la rimeco de la personaj pronomoj (mi, vi, li, ktp.) kaj per apostrofado de la substantivo la eblon traduki eĉ poemojn kun nure viraj rimoj. Ido kontraŭe havas malrimecajn formojn de la pronomoj personaj (me, tu, vu, il, el, ol; ni, vi, li), plie ĝi apostrofas la adjektivon kiu, ĝenerale, estas malpli ofta ol la substantivoj en la frazoj.

2.e. La pli multaj sufiksoj de Ido plimalfaciligas la rimadon (ekz-e „ora“ oni povas rimi al „labora“ sed ne al „laboroza“; ju pli oni havas sufiksojn des pli granda estas la tento trouzi ilin por la rimado. Tio certe estas evitinda*). Sufiks-rimado estas certe pli malbona ol rimado kaŭzita per finaĵo de substantivo, akuzativo, participo ktp. D-ro Borgius tiun rimadon jam riproĉis al Esperanto.

Sed mi diras: oni certe neniam mal-laŭdis en germana lingvo rimojn kiel „tragen, wagen“, „endend, blendend“. aŭ eĉ, laŭ Goethe: „tätig ihn preisenden. Liebe beweisenden, brüderlich speisenden, predigend weisenden, Wonne verheissenden...“ Male, mi kredas, se oni en germana lingvo havus substantivajn ktp. finaĵojn, kiel en Esperanto, kaj tial ne povus rimi „Hund, (hundo) kun „und“ (kaj), kiam oni tion povus fari en la proponata internacia lingvo, tiam oni certe aŭdus la riproĉegojn de la samaj sinjoroj kiuj nun malŝatigas Esperanton.

*) Tial oni ne devas konsili aŭ aspiri tutan forigon de sufiks - ŝajnaj silaboj en vortradikoj (nikotino, kantino, obstino).

Ankaŭ ĉi tie, kie aliloke oni devas diri: tiuj sinjoroj estas tute kaptitaj de likutimaj formoj, ili neniel povas alkutimiĝa ĉil io nova, tio ja estas la ĝusta signo de aŭj kleruloj, kiuj nur vivadas kaj vere tefan sentas en la pasintaĵoj.

Alia, kaj vere ĉefa kaŭzo, ke Ido ne povas superi Esperanton rilate la poezio, estas jena: La Idanoj celas fari sian lingvon kiel eble matematika, ĉiu scias ke poezio kaj matematiko estas veraj ekstremoj. La Idanoj eble diros: jes, ni ja ne volas poezian lingvon, ni celas nur lingvon taŭgan por praktikaj celoj, por komercaj, politikaj, sciencaj intertraktoj. Sed mi demandas: ĉu niaj naciaj lingvoj ĝis nun ne plene taŭgis por tiuj celoj, kvankam ili ne estas tiel precizaj kaj logikaj kiel Esperanto, kial estas necese ankoraŭ pli rigide konstrui la helpan lingvon? Malgrandan pruvon pri la Idana scienceco mi donas: ni havas en Esperanto la vorton „flugpendi“ (nun oni ankaŭ uzas „ŝvebi“); ĉu „flugpendi“ ne estas poezia vorto por montri la aglon tutsupre ĉe la ĉielo? Kion faras la kleraj malpoetaj Idanoj? Ili elektas „glitflugar“, „ĉar“, diras gravamiene la ĉefego: „l'ucelo glitflugas kontre la vento; do ol diplasas su en l'aero, quankam ol semblas senmova de la tero“ (la birdo glitflugas kontraŭ la vento, do ĝi delokiĝas en la aero, kvankam ĝi ŝajnas senmova de la tero). Mi vere ne miros, kiam baldaŭ la „poeziemaj“ sinjoroj malpermesos en sia lingvo esprimojn kiel „la suno leviĝas“, kaj postulos la diron: „la tero turniĝas kontraŭ la suno“. Mi fine atentigas la

legantojn al la bonega artikolo de s-ro de Beaufront „Ĉu Esperanto taŭgas por la literaturo?“ (Esperantaj Prozaĵoj pĝ. 231^a), kie li diras: „internacia lingvo taŭgas por nenio, se ĝi ne taŭgas por ĉio.“

Mi finas tiun ĉi parton per cito de letero de franca verkisto Léon Frapier^{*}): „El mia vidpunkto de filozofa kaj verkisto, kio min plej multe frapis, estas la literatura, kaj sekve la socia valoro de tiu lingvo. Tio estas laŭ mia opinio, la plej certa garantio de ĝia estonta sukceso; lingvo pure komerca kaj afera neniam vivos kaj disvastiĝos. Lingvo inda de tiu nomo, devas esti la ĉiam preta instrumento, per kiu vibras niaj ĝojoj kaj doloroj. Nur per tiu signo ni ĝin rekonos... Mi estis frapata de la neatendita kaj ofte rimarkinda valoro de la Esperantaj tradukaĵoj. D-ro Zamenhof, aparte, faris pri kelkaj klasikaj ĉefverkoj, nome Hamlet, la Rabistoj kaj Ifigenio, tradukojn, pri kiuj mi povas aserti, ke ne ekzistas pli bonaj en iu ajn lingvo. Esperanto estas vivinda kaj vivos, ne nur ĉar ĝi faciligas la komercajn kaj turismajn interrilatojn, sed ĉar ĝi montris sin kapabla faciligi la reciprokan interpenetrigon de la popoloj sur la kampo de l' inteligenteco kaj penso, kaj tiel festi la alvenon de frateco, kies revo ŝajnas al ni „fine realigebla“.

Fine mi resumu la diversajn punktojn kial Ido ne povas superi Esperanton:

1-e Ido ne havas firman fundamenton, ĝia kvazaŭ-fundamento estas la scienc-eco, sed kiu scias kiom oni ŝanĝas la

*) „Esperanto“ № 93 pĝ. 10.

opiniojn en la scienca kampo, laŭ tempoj, landoj kaj, eĉ interne de ili, laŭ personoj, tiu ne havas multan fidon. La plibonigemo skribita sur la standardo de Ido ne haltos ĉe la nun dekunu ididoj, aŭ Antidoj, Reform-Idoj. Ju pli multaj estos la Idanoj, des pli grava estos la danĝero de disiĝo en Idujo.

2-e Ido ĉiam pli fariĝas lingvo por kleruloj, en kiun oni enŝovas subtilaĵojn nenecesajn, pli malfaciligante per tio la lingvon, pli grandigante la vortaron. Ĝia vortkonstruo estas artifika, kaj kontraŭ la natura lingvosento.

3-e La Idanoj laŭ nombro ne atingos la Esperantistojn, se tiuj ĉi ne lasas sin hipnotigi per la diroj de tiuj. Ĉar ili komparas malĝuste Esperanton kun Volapük, dum ili pli rajte uzus komparon inter du ĉefaj nunaj stenografiaj sistemoj. La unua komparo estas vere ridinda, se oni rigardas la sukcesojn de Esperanto, ĝuste dum la du lastaj jaroj.

4-e La klareco estas en Ido malplia, tio estas parte kaŭzita de la gramatika simpligo (akuzativo malofta, nevarieblo de adjektivo), parte de diversaj vortaraj formoj.

5-e La ĝusta transkribo de propraj nomoj estas en Ido malpli ebla ol en Esperanto, kaj ĉi tie oni povas aldoni ke per konservado de la antikva „qu“ oni forigis rimedon iam forĵeti tiun balaston en multaj lingvoj; kaj plie: per tiu litero oni malfaciligas sennecese la skribadon por multaj aliaj popoloj.

6-e Por la poezio, Ido ne estas taŭga

laŭ la aserto de Idestroj mem; tia manko estas tiel grava, ke oni kompanse bone povas akcepti en Esperanto kelkajn formojn kiujn la Idanoj nomas malbelaj, ekz-e la laŭdire multajn silbantajn konsonantojn*), ofte tro multajn „aj“, „aŭ“, „oj“**).

Eĉ kiam oni estas infektita de la ĉiamaj diradoj de l' Idanoj kaj ne volonte aŭdas oftajn aj-sonojn, ni havus rimedon anstataŭi ilin per alia plinombra formo, kion montris d-ro de S a u s s u r e en sia broŝuro „Teoria ekzameno de la lingvo Esperanto“*).

Sed — kion diris pri Esperanto prof-ro Diels, ĉe la universitato en Berlin, li, malamiko de iu ajn artefarita lingvo? Li nomas Esperanton „lautlich wohlklingend, syntaktisch aber missgestaltet“ (laŭsone agrabla, sed laŭsintakse kripla)**): Plie: „kompreneble estas, ke la francoj akceptis kun entuziasmo tiun esperigan melodian lingvon“. Nu kiam malamiko atestas belsonecon kaj melodiecon, tiam ni povas esti kontentaj tiurilate, precipe pripensante, ke ĉiu ajn lingvo, ne escepte Ido, havas formojn, kiuj ne plaĉas al ĉiu.

*) Ke ili ne estas pli oftaj ol en la ĉefa-eŭropaj lingvoj, mi montris en „Bedarf Espej ranto der Verbesserung?“ pĝ 25, 26. (Ĉu Esp-o bezonas plibonigon?, eldonita de Germ Esp-o Asocio, 0,150 Sm.)


***) En la ĵus citita broŝuro, pĝ 26, mi montris ke la germana lingvo ne havas malpli da tiaj sonoj; do almenaŭ germanoj ne rajtas plendi pri ili.

Italaj kaj slavaj — ankaŭ ne. Rim. de la Redakcio.

*) Librejo Kündig, Genevo, 1 Sm.

***) Tiu riproĉo same trafas Idon.

Nun oni celas de la Idana partio interŝtatan lingvo-oficejon en Bern. La Esperantistoj povas ĝoje konsenti; se ĝi tiam havos komision fidindan, ni esperu ke ĝis tiam nia lingvo estu tiel vastigita kaj ĉie uzata, ke la decido de tiu komisio, certe pli grava kaj pli potenca ol estis en 1907 la Pariza, donos al Esperanto la gustan lokon kiun ĝi meritas laŭ sia mirinda uzeblo por ĉiuj rilatoj de l' homo vivo.




VERKAJOJ de P. Christaller
(La verkoj kie estas citita la eldonejo estas mendeblaj ĉi librejo Sichman, Riga).

1. **Tradukoj:** FORMULO PRI MALARMO de O. U m f r i d (Libraro pacifisma № 13^a.)
2. **Gazetartikoloj** en diversaj Esp^o gazetoj, ekz^e SCIENCA REVUO 1904³⁵⁰; TRA LA MONDO I pĝ. 7 (pri F r. S i l l e r) II pĝ. 24 (pri P. R o s e g g e r): pĝ. 174; „ESPERANTO“ III^a jaro № 1. LA DUONMONATA 1909 pĝ. 23, 40; DANA ESPERANTISTO 1909³⁸; UNIVERSO 1910³⁴² Vojaĝo tra Ŝvaba lando); AMERIKA ESPERANTISTO Majo 1911,²⁸; ktp.
3. **Lingvaj studoj:** KRITIKOJ KAJ REFORMPROPOŬOJ (Eho Esperantista 1908 № 21, 22); ESPERANTO SIMPLIGITA? (Eho Esperantisto 1908 № 26). BEDARF ESPE- RANTO DER VERBESSERUNG? (Ĉu Esperanto bezonas reformon?) germanlingva, eldonita de Germ. Esp^o Asocio, Möller & Borel, Berlin. PROPRAJ NOMOJ Dekspesdeka Biblioteko № 2^a (Ĝesperanto-Propaganda Instituto, Lindenstr. 18, Leipzig). WAFFEN FÜR ESPERANTO (armiloj por Esperanto) germanlingva eldonata de Germ. Esp^o Asocio en la kongresa libro por la kongreso Germana 1912, Danzig-Zoppot.
4. **Vortaraj laboroj:** WÖRTERBUCH DEUTSCH — ESPERANTO (Ger-

II.

- man — Esperanta Vortaro) Möller & Borel, Berlin. Bindita 2,400 sm.
VORTARA KONKURSO vidusub. 6.
5. **Gramatika laboro: WELTSPRACHEN U. ESPERANTO** (Mondlingvoj kaj Esperanto) germanlingva; Mallonga historio de universalaj lingvoj kaj de Esperanto; gramatiko kaj vortaroj. Enhavata en la 6^a volumo de „Bibliothek des allgemeinen u. praktischen Wissens.“ (Biblioteko de ĝeneralaj kaj praktikaj sciencoj) Bong & K^o, Berlin. Lukse bindita 6,250 Sm
 6. **Premiitaj konkursaj laboroj:**
 - a. **KONGRESA POEMO**; 1^a premio konkurso de „La Revuo,“ Dresden 1908.
 - b. **REGNO DE HOMOJ**; 2^a premio de la Zamenhofa konkurso ĉe „Floraj Ludoj“ en Barcelono 1909.
 - c. **VORTARO GERMAN — ESPERANTA** (literoj A, AB, AC). Samvalora premio kun 2 aliaj konkursintoj Germa Esperanto — Asocio 1910.
 7. **Propagandaj germanlingvaj artikoloj kaj verkaĵoj** en multnombraj gazetoj ktp., interalie: „**ESPERANTO — LEHRMITTEL**“ (Esperantaj lerniloj); „**ESPERANTO UND NATIONALISMUS**“ en la Kongresa libro de l' Germana Kongreso en Lübek 1911, Möller & Borel Berlin, 1 Sm. „In Siegeszug durch die Welt“ (Venkante tra la mondo) Esperanto — Propaganda Instituto, Leipzig. „Die Delegation“ Germana Esperantisto, 1911, pĝ. 70^a Möller & Borel, Berlin.

1. Propaganda der germanischen Welt
2. Propaganda der germanischen Welt
3. Propaganda der germanischen Welt
4. Propaganda der germanischen Welt
5. Propaganda der germanischen Welt
6. Propaganda der germanischen Welt
7. Propaganda der germanischen Welt
8. Propaganda der germanischen Welt
9. Propaganda der germanischen Welt
10. Propaganda der germanischen Welt
11. Propaganda der germanischen Welt
12. Propaganda der germanischen Welt
13. Propaganda der germanischen Welt
14. Propaganda der germanischen Welt
15. Propaganda der germanischen Welt
16. Propaganda der germanischen Welt
17. Propaganda der germanischen Welt
18. Propaganda der germanischen Welt
19. Propaganda der germanischen Welt
20. Propaganda der germanischen Welt
21. Propaganda der germanischen Welt
22. Propaganda der germanischen Welt
23. Propaganda der germanischen Welt
24. Propaganda der germanischen Welt
25. Propaganda der germanischen Welt
26. Propaganda der germanischen Welt
27. Propaganda der germanischen Welt
28. Propaganda der germanischen Welt
29. Propaganda der germanischen Welt
30. Propaganda der germanischen Welt
31. Propaganda der germanischen Welt
32. Propaganda der germanischen Welt
33. Propaganda der germanischen Welt
34. Propaganda der germanischen Welt
35. Propaganda der germanischen Welt
36. Propaganda der germanischen Welt
37. Propaganda der germanischen Welt
38. Propaganda der germanischen Welt
39. Propaganda der germanischen Welt
40. Propaganda der germanischen Welt
41. Propaganda der germanischen Welt
42. Propaganda der germanischen Welt
43. Propaganda der germanischen Welt
44. Propaganda der germanischen Welt
45. Propaganda der germanischen Welt
46. Propaganda der germanischen Welt
47. Propaganda der germanischen Welt
48. Propaganda der germanischen Welt
49. Propaganda der germanischen Welt
50. Propaganda der germanischen Welt



Esperanta Universal-Biblioteko.

Kolekto de „Riga Stelo“.

- № 1. Leonido Andreev. Ben-Tovit.
№ 2. Leo Belmont, La Radioj de Roentgen.
№ 3. Ŝcavinski. Kometo de Haleo. Krimo.
№ 4—7. Leo Tolstoj. La Morto de Ivano Iljiĉ.
№ 8. Prof. Paul Christaller. Kial Ido en la rolo de Internacia Lingvo ne povas superi la lingvon Esperanto?

Aĉetebla ĉe:

- „Riga Stelo“ Tapetastr. 4, Riga
„Esperanto-Librejo“ Tverskaja 26,
Moskvo.
„Esperanto-Verlag Möller & Borel
Lindenstr. 18-19, Berlin.
„Esperantista Centra Librejo 51,
rue de Clichy, Paris.

Цѣна 25 коп. — Prezo Sm. 0,25.

PSIĤO-GRAFOLOGIA INSTITUTO

„Riga Stelo“.

Grafologia portreto Sm. 2,00.

Por esperantistoj Sm. 1,00.

AB 1933